TEA-BULTENO

24ª JARO - N° 159 **JULIO - AÚGUSTO** **N. 7-8/2021**

Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne ekzistus poetoj.
Raymond Schwartz, franca esperantisto, tradukisto, poeto (1894-1973)

El la Schwartz-a ridpunkto!

Certe ĉiu el vi, almenaŭ unu fojon en via vivo, renkontis la spritaĵojn, ŝercojn, humuraĵojn kaj ridigaĵojn verkitajn de Raymond Schwartz. Mi posedas kelke de liaj libroj, kiujn fojfoje mi reprenas enmane, ĉar *sana* ridado forgesigas, eĉ se nur momente, proprajn problemojn. Tiu poeta humuristo estas al mi aparte kara, ĉar li helpis min akiri sukcese la tria-gradan ekzamendiplomon. Tamen ĉio ĉi estas tute alia historio. Mia intenco ekde ĉi numero estas, de tempo al tempo, distri kaj gajigi vin per iuj liaj plej signifaj ŝercaj vortĵonglaĵoj: en tiu ĉi periodo *post*-pandemia estas bezonate, ĉu ne? Nu, jen al vi kelkaj amuzaĵoj el *...Kun sia-speca spico*!

AL LA LEGONTOJ!

Libro-amik', legonte ĉi volumon
senigu vin de grumblo kaj afekt':
ja bonintenc' gvidadis mian plumon,
eĉ se Tabu' fariĝis ŝerc-objekt';
kaj certas, ke neniam ĝis perfekt'
altigis sin la ridocela sago -
sed vidi vin en kaĉ' de l' ĉiutago
restigis min ĉe tiu aksiom',
ke «Pli ol plor' valoras ĝoja blago,
ĉar estas Rid' proprajo de la hom'!»

VOKALAJ NUANCOJ

Viro sidas ĉe riverbordo kun hokfadeno: **fiŝisto**.
Pasanto malbonintence puŝas lin en la akvon: **faŝisto**.
La viro ĉe la riverbordo falas en la akvon: **fuŝisto**.

"Silento valoras oron!" - Tio estas **moto**.
Ĉiuj silentas. - Tio estas **muto**.
Virino silentas. - Tio estas **mito**.

PROGRESO

Adamo kaj Evo estis solaj sur la Tero. Kaj tamen, unu tagon - neniu scias, de kie - venis tria homo. Li estis viro. Videble. Kaj li diris al Adamo:

"Mi tre dezirus pasigi unu duonhoron kun via edzino. Ĉu vi bonvolas doni ŝin al mi?!

"Doni?" miris Adamo. "Doni? Certe ne! Sed, se temas nur pri unu duonhoro, vi povas lui ŝin."

"Lui ŝin? Jen bona ideo!" ekĝojis la tria homo, kaj kun plezuro li konstatis: "Kiel simple kaj senkonflikte! Jam komenciĝis la progreso!"

"Jes", konkludis Adamo, "progreso dank' al... Evoluo!"

Ĉu vi ŝatis legi ĉi spritaĵojn? Se jes, ankoraŭ legeblos en venontaj TEA-Bultenoj. *Via Red*.

5ª TRADUKKONKURSO LUCIJA BORČIĆ

Honore al tiu ĉi elstara verkistino kaj tradukistino (26.07.1921-14.11.2015) Kroata Esperantista Unuiĝo lanĉas la 5an literaturan tradukkonkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La Konkursaj branĉoj estas jenaj:

· poezio: maksimuma longo ne fiksita;

· prozo - rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj).

La rezultojn oni publike anoncos la 14an de novembro 2021 en Zagrebo, okaze de la 6ª memorkunveno al Lucija Borčić.

La organizantoj disdonos po tri premiojn ĉiubranĉe. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu Esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj, kiuj antaŭe ne estis publikigitaj, en presa, reta, bloga aŭ fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn:

★ *personan kaj familian nomojn, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto;*

★ *titolon de la originalo, personan kaj familian nomojn kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.*

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso: hes@hes-keu.hr ĝis la 23ª de aŭgusto 2021.

La premioj konsistas el diplomoj.

La organizantoj de la konkurso prizorgos la presadon de la premiitaj tradukoj konforme al la reguloj preskribitaj por tiu agado (respekto de aŭtoraj rajtoj ktp). **www.hes-keu.hr**

AKADEMIO DE LA ITALA KINO — PREMIOJ DAVID di DONATELLO

ACCADEMIA DEL CINEMA ITALIANO — PREMI DAVID DI DONATELLO

2021 - Premiojn DAVID DE DONATELLO ricevis la filmo

LA NEKREDEBLA HISTORIO PRI INSULO DE ROZOJ

La premia cerimonio okazis la 11[an] de majo 2021 en la Studio 5, Studioj RAI *Fabrizio Frizzi* kaj Oper-teatro en Romo, kaj estis dissendita televide per RAI 1.

Tri David de Donatello estis disdonitaj al:

1) Stefano LEONI kaj Elisabetta ROCCA **pro la plej bonaj videfektoj**;

2) Matilda DE ANGELIS**,** kiel **la plej talenta neprotagonista aktorino**;

3) Fabrizio BENTIVOGLIO, kiel **la plej talenta neprotagonista aktoro.**

Kiel sciate, la historio de la Insulo de la Rozoj disvolviĝis ekde la jaro 1968, kiam la bolonja inĝ. Giorgio Rosa konstruis etan platformon, je 11 km-oj (6 marmejloj) for de la marbordo vid-al-vide al Rimini, kaj proklamis ĝian sendependecon.

La Esperanta Respubliko de la Insulo de la Rozoj estis rekonita de neniu Ŝtato; tamen dum ĝia mallonga vivo estis emisiitaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampo kun la surskribo: *Verda Haveno*. La oficiala lingvo estis Esperanto, kompreneble.

Filatelaj emisioj pri la Insulo de la Rozoj





Majo/junio 1968 - La Insulo de la Rozoj eldonis ĉ. 5000 ekzemplerojn je valoro de 30- Mills

Cento da ekzempleroj surskribitaj per: Itala Okupado

Ĉirkaŭ je la 11[a] de februaro 1969, *emisio* pri la eksplodanta insulo. Maldekstrangule nigra streketo, funebrosigne, kaj surskribo en la latina: *Hostium rabies diruit opus non ideam* - Perforto detruas la faron, ne la ideon.





Sceno el la filmo

Bedaŭrinde, en 1969, la insulo estis okupita kaj detruita de la italiaj aŭtoritatoj.

Malgraŭ longa tempopaso, tiu historia fakto ne estis tute forgesita. Sufiĉas mencii, ke ekz. Walter Veltroni, politikisto, ĵurnalisto, reĝisoro, inspiriĝis el tiu ĉi okazintaĵo por verki romanon, kies titolo estas *La insulo kaj la rozoj* (2012).

La filmo estis dissendita de *Netflix*, direktita de Sydney Sibilia, juna reĝisorino. Krom la jam menciitaj, partoprenis aliaj prestiĝaj aktoroj, el kiuj Elio Germano kaj Luca Zingaretti.

Fontoj: Controluce, Portale d Cultura e informazione (web); Itala Esperanto-Federacio - www.esperanto.it.

Pliaj informoj riceveblas ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_de_la_Rozoj kaj https://eo.wikipedia.org/wiki/





De la 26[a] de julio ĝis la 28[a] de septembro 2014 okazis en Berceto, apud Parma, ekspozicio pri *La insulo kiu ne estas*. Por la inaŭgura tago estis eldonitaj stampo kun la bildo de tri rozoj, *ŝtata emblemo* de la insulo, poŝtkartoj kaj kovertoj. Estis menditaj en Slovenio individuaj poŝtmarkoj: sur unu aperis la koordinatoj de la platformo, sur la alia ĝiaj restaĵoj marfunde. Interese estas, ke la poŝtmarkoj pri la *Libera Teritorio* estas arde *ĉasataj* ankaŭ de neesperantistaj filatelistoj!

Laste trovitaj!


Ho, kia bela poŝtkarto, kia bunteco de koloroj, kia arta grafikstilo! Hazarde ĝin mi malkovras en aŭkciejo kaj do, vidite-farite: ĝi jam kuŝas en mia kolektujo. Miaopinie ĝi meritas ĉies laŭdon.

En la apuda, blanka strio, la skribinto klarigas pri ĝi jene:

Tiu ĉi bildeto prezentas diplomon, kiun donis al sia honora membro T. G. Masarykovi[1] la gimnastika societo en la urbeto Valašské Meziříčí (kie vi vizitis gobelinojn). La bildon pentris mia kolego Jaroslav Kučera, kiu estas sufiĉe sperta aŭtodidakta pentristo.



La legado de la malantaŭa parto min agrable surprizas, ĉar fine de la mesaĝo evidentiĝas ke subskribis ĝin la grava esperantisto ĉeĥa, Theodor Čejka. Li estis skribinta al amika paro Jacobs el Antverpeno, de sia urbo Bystřice pod Hostýnem, memorigante pri iliaj komunaj vizitoj kaj foto-ekskursoj en sia patrujo. Supozeble la belgaj gesamideanoj partoprenis en la UK en Prago, ĉar la poŝtkarto estis datita je septembro 1921.




Do, jen trafa oportuno por konatiĝi kun tiu ĉi pionira esperantisto el Ĉeĥoslovakio.

Theodor Nepomuk Čejka naskiĝas en 1878 en Holešov, kaj mortas en Chvalčov, en 1957.

Li abiturientiĝas en 1898 kiel instruisto kaj tuj ricevas okupon en bazlernejo de Bystřice pod Hostýnem, kie post iom da tempo li transiĝas al altgrada instituto. Th. Čejka estas elstara edukisto, kies precipa celo estas sentemigi siajn lernantojn al amo al patrujo kaj naturo, eĉ per instruado de la fundamentoj pri fruktokultivado.

En 1925 okazas lia edziĝo kun Dobroslava Ryčanová, kiun li mencias en la supra poŝtkarto. Tre frue li konatiĝas, supozeble antaŭ la jaro 1900, kun la internacia lingvo, kiun tuj li komencas propagandi. Probable ĝin li ellernas per la E-gramatiko de Francisko Vladomir Lorenz[2]: *Esperanto por Bohemoj*, 1890. Kune kun du siaj kolegoj, Jan Holub kaj Valentin Bilík, li tradukas el la germana al la ĉeĥa lingvo broŝureton titolitan *Universala lingvo Esperanto*, kiun ili aperigas proprakoste. Poste la triopo prilaboras kaj, en 1900(?), eldonas la lernolibron *Esperanto. Internacia lingvo. Kompleta gramatiko kaj ekzerclibro kun vortaro Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta*. Ĝi estas la unua ampleksa ĉeĥa lernolibro pri Esperanto. Gravan kontribuon donas kaj tiu instruilo kaj liaj informiloj al la ekesto de la *Unua societo de esperantistoj aŭstriaj en Brno* (1901), tiom ke oni konsideras lin unu el la fondintoj de la Eo-movado en la tiama Aŭstra-Hungara imperio. En 1906 Th. Čejka skribas al D-ro Zamenhof leteron, per kiu li petas etajn informojn pri lia vivo. La Majstro ĝentile respondas per la jena poŝtkarto.



Dum sia longa *kariero* esperantista li publikigas 14 lernolibrojn plus vortarojn kaj prilingvajn artikolojn. Al tiuj kompreneble sekvas, en la postaj jaroj, pluraj aliaj reeldonoj, plikompletigitaj kaj pliriĉigitaj.

Th. Čejka ankaŭ fondas kaj redaktas ĉi Esperantajn gazetojn: *Revuo internacia. Monata gazeto*, kiu aperas nur en la jaroj 1902-1903, *Český esperantista - Bohema esperantisto*, ekde 1902, kaj *Der Deutsche Esperantist-Germana esperantisto*.



➔

➔ Li partoprenas en la unuaj tri UK-j: Bulonjo ĉe maro, 1905, kie li persone konatiĝas kun nia Majstro; Ĝenevo, 1906; Kembriĝo, 1907, dum kiu li estas elektita Lingva Komitatano.





Sur la foto videblas:

4ª vico: Th. Čejka, Otto Simon, *Vieno*; Alfred Michaux, *Bulonjo-ĉe-Maro*; Felix Stone Moscheles, *Londono*; Carlo Bourlet, *Parizo*.

3ª vico: Henri Dor, *Dijono*; Théophile Cart, *Parizo*; Clarence Bicknell, *Bordighera*, *Italio*.

2ª vico: Harold Bolingbroke Mudie, *Londono*; Émile Boirac, *Parizo*; L. L. Zamenhof; Louis de Beaufront, *Louviers*; John Pollen, *Hindio*; Rosa Junck, *Bordighera*; Kazimierz Bein, *Varsovio*; Gaston Moch, *Parizo*.

1ª vico, centre: Alfons Sabadell, *Barcelono*.

Dum sia ĉeesto en la 1ª UK, certe li partoprenas en la kunsido, dum kiu oni priparolas la utilegon varbi al Esperanto kiel eble plej da edukistoj tra la tuta mondo. Tiam eĉ estas fondita la unua porinstruista societo, nome *Esperantista Unuiĝo de Francaj Edukistoj*, kiel unua organizaĵa provo. Sed ŝajne estas ankoraŭ tro frue akcepti tian defion, ankaŭ pro realaj kaj konkretaj malhelpaĵoj. Malgraŭ tio, antaŭ la 2ª UK en Ĝenevo, jen aperas anonco de Th. Čejka en *Esperanto* per kiu li alvokas la Instruistojn kunveni ĝiakadre. Ĉi sube la originalo aperinta en *Esperanto n. 23,* 1906.



Al Instruistoj Kongresanoj.

Estus tre utile, se povus kunveni kaj reciproke konatiĝi kolegoj instruistoj, kiuj ĉeestos en la dua kongreso. Multego da grava kaj priparolinda materialo certe ne mankas.

Tiel efektiviĝus la I-a internacia kongreso de instruistoj esperantistoj. Kolegoj, kiuj intencas partopreni en tiu kunveno, volu tuj sendi sian adreson kaj proponojn al Teodor Čejka, Instruisto en Bystrice-Hostyn, Moravlando-Aŭstrio.

La plej zorgigaj kaj pritraktindaj problemoj, prie atentigas Émile Boirac, *estas la diferencoj inter la diversaj ŝtataj programoj en la instruada kampo tra la mondo*. Sed tio certe ne bremsas la entreprenemon de Th. Čejka, kiu firme kaj fervore aktiviĝas por la realigo de sia neprokrastinda projekto. Feliĉe ĉio jam konkretiĝas dum la Kembriĝa UK. Unuvoĉe estas akceptita la propono de la rusa gimnazia inspektoro Roman Frenkel, krei la *Internacian Asocion de Instruistoj* (*IAI*), kies celoj estas: 1. Ĉiujare eldonadi adresaron de instruistoj kaj lernantoj sciantaj Esperanton; 2. Eldonadi librojn en E-o por infanoj; 3. Plifaciligadi la vojaĝon de lernantoj kun iliaj instruistoj; 4. Organizi korespondadon inter instruistoj kaj lernantoj.

En la komitato, tuj starigita, membriĝas, kun la tasko de kasisto, ankaŭ Th. Čejka. Dum la sama kunveno li proponas sin kiel direktoro kaj eldonisto de la, aperonta, gazeto *Internacia Pedagogia Revuo*, kiu estos la organo de *IAI*: tio ĉi estas unuanime bonvenigata. Post la kunveno li jam enkasigas la pagon de pli ol 70 instruistoj por ricevado de la *IPR*. Grandioza sukcesa rezulto!!!




JARO I NOVEMBRO 1908 Nro 1

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA

INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ



Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.): Honora prezidanto: Dro E. Boirac, rektoro de la universitato, Dijon (Francujo). — Prezidanto: Th. Cart, profesoro de la universitato en Paris. — Vicprezidantoj: F. Maréchal, profesoro en Leeds (Anglujo), frl. de Chalnet en Haag (Nederlando), R. Frenkel, inspektoro de gimnazio en Enisejsk (Siberio). — Sekretario: F. Durieux, direktoro de lernejo en Lille (Francujo). — Kasisto: Th. Čejka, instruisto en Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).

Membra kotizaĵo por 1 jaro 1 Sm (= 2·5 Fr. = 2·40 K = 2 sh = 2 Mk = 1/2 dol. = 1 Rb = 2·50 peset.) estu sendata per poŝta mandato aŭ ĉeko al la kasisto. — **Membroj de la I. A. I. ricevas la oficialan organon senpage.**

La estigo de tiu ĉi tiel grava institucio por la tuta E-movado, ĉu pasinta ĉu nuntempa, estas unu el la plej grandaj meritoj de ĉi pionira ĉeĥa esperantisto.

Post la unua mondmilito, kiun li pasigas laborante por la Ruĝa Kruco en Kroměříž, li iom retiriĝas, sed daŭre plu fidelas al Esperanto. Li dediĉas sin precipe al edukado de knaboj per ĝardenistiko, turismo, biciklado, skiado kaj ĉefe per skoltismo kaj per la *woodcraft*-movado[3] fondita de Ernest Thompson Seton[4], kiu proksimigas la homon al la naturo. Skoltojn li reprezentas i.a. dum la 13ª UK en Prago, 1921.

Sed ne nur al Esperanto li manplene donacas siajn ideojn, sciojn kaj spertojn: li vaste kontribuas al disvolviĝo kultura kaj ekonomia de ➔

➔ la urbeto kie li longatempe vivis kaj laboris. Lia nomo estas enskribita en la listo de la elstaraj civitanoj en la urba historio.

Post sia emeritiĝo, 1937, Th. Čejka translokiĝas al Chvalčova Lhota en dometo, kiun li mem projektas kaj kie li en 1957 forpasas. Li estas entombigita en Bystřice pod Hostýnem.

Elstara estiminda homo: edukisto kaj esperantisto, amanto de la kulturo kaj de la naturo, sed precipe amanto de la homoj, kiujn ĉiel li klopodis helpi mense, spirite kaj bonfareme.

Elo

El *LA PRAKTIKO*, dec. 1966


Esperanta monumento de Th. Čejka estis inaŭgurita en la Jubilea Parko en Příbor, Bohemio, la 21an de junio 1964. Li studis en ĉi urbo dum la jaroj 1894-98 ĉe la Pedagogia Instituto. La elkonstruon de la monumento ebligis la Urba Nacia Komitato, donacinte lokon kaj ĉiujn materialojn necesajn por la libervola laboro de Esperanto-rondetanoj.



Notoj:

1. Tomáš Garrigue Masaryk, sociologo, filozofo kaj politikisto, unua prezidanto de Ĉeĥoslovakio. Li fondis la Universitaton en Brno, klopodis malprovincanigi la kulturan medion en sia lando, sin firme oponadis al rasaj antaŭjuĝoj kaj antisemitismo. Li subtenis sian edzinon, kies familian nomon *Garrigue* li alprenis ŝiaomaĝe, en ŝia luktado por virina emancipiĝo. Krome li vigle aktivadis por *krei* ĉeĥoslovakan Ŝtaton, firme defendante ĝiajn kulturon kaj lingvon.

2. František Vladimír Lorenc (ĉeĥe); Francisko Valdomiro Lorenc (1872-1957). Ĉeĥa esperantisto, vivinta la plejparton de sia vivo en Brazilo. En 1890 li aŭtoris la unuan lernolibron de esperanto por bohemoj. En Brazilo li alvenis kiel politika rifuĝinto. Post akiro de laborpermeso li estis dungita en la enlanda servo por enmigrado post lingvotesta ekzameno en pli ol 10 lingvoj!!! Fr. Lorenc verkis pli ol 100 librojn. Estis poligloto kaj sciis pli ol 80 lingvojn. Li okupiĝis pri stenografio, jogo, esotera filozofio, spiritismo, astrologio, rozkrucismo k.a.


ÚPLNÁ UČEBNICE
mezinárodní řeči dra. Esperanta.
Napsal Fr. Vl. L.
PLENA LERNOLIBRO
de la lingvo internacia de dro. Esperanto.
Por Bohemoj skribis
Fr. Vl. L.

En Dom Feliciano, Brazila ŝtato Rio Grande do Sul, estis inaŭgurita en 2012 monumento honore al tiu eminentulo, en ĉeesto de liaj posteuloj, krom kompreneble de lokaj aŭtoritatoj, ĉeĥa ambasadoro, esperantistoj, k.a.



3. *Wood-craft*-movado: kultura pedagogia movado, kies gvidilo estas la naturo.

4. Ernest Thompson Seton (1860-1946) estis eseisto, verkisto, natursciencisto kaj desegnisto. Li naskiĝis en Britujo de skotaj gepatroj kun kiuj li, ses-jara, translokiĝis al Kanado. Li estis pioniro de skoltismo, antaŭ Robert Baden-Powell, kiu mem inspiriĝis el liaj libroj kaj estis en koresponda kontakto kun li. Poste Ernest Seton fondis la Usonan skoltan movadon, al kiu multe li kontribuis enkondukante en ĝin la kulturon de la *amerikaj indianoj*, aŭ pli bone, *denaskaj amerikanoj*.

Fontoj: Vikipedio; Esperanto-Muzeo Vieno (*periodaĵoj*); EdE;
el *Paneloj por la ekspozicio "La Homo kontraŭ Babelo" - Esperanto-Muzeo en Svitavy*; La Praktiko, 1966.

Cerbumu, cerbumu... *diras nia Viglo, kiu ŝatas ŝvitigi nin dum ĉi varmaj someraj tagoj per siaj enigmaj cerbotikliloj.*

CERBOTIKLILO N° 1

a) b) c) d)



Atente rigardu la suprajn bildojn kaj diru kian oni povas, laŭ logiko, konsideri entrudiĝintan.

CERBOTIKLILO N° 2

1 → 1/2 → 1/6 → 1/24 → 1/120 → ?

Atente rigardu la supran nombrovicon kaj diru, laŭ logika kriterio, kiu cifero devas anstataŭi la finan ĉusignon.


Viglo tamen estas bonkora, ĉar jam li havigis al mi la premion por kiu solvos ambaŭ cerbotiklilojn. Nu, vi havas tempon ĝis la duono de aŭgusto por sendi la ĝustan solvon. Sukceson al vi!



La juna firmao *KULERO* en Göttingen produktas bongustajn manĝeblajn kulerojn kaj kuleretojn kaj ĉi tion jam dufoje ili prezentis ĉe televida germana programo por inventistoj. Dum ĝi la entreprenista teamo menciis, ke ili malhazarde elektis la nomon de sia firmao, klarigante ke tiu vorto estas belsona kaj merkatumebla. Ĉiaokaze ili faras bonan reklamon al Esperanto.

Navigetu tra ilia retejo kaj malkovru kion ili produktas! www.kulero.de

Fonto: Harca Esperanto-Kuriero, informilo de Internacia Centro Herzberg - aprilo 2021.



Espéranto–France prezentas libron bunte ilustritan, kun plur-aj amuzaj ekzercoj (kaj korektoj). Regi-stritaj voĉoj dispon-eblas reteje por per-sonoj kiuj aĉetis la li-bron.

Provpaĝoj, priskribo kaj detaloj troviĝas ĉe: https://facilaj-rakontoj.esperanto-france.org/

Enhavo: La rakonto okazas en Korsiko, insulo sude de Francio. Estas la lerneja jarfino kaj la lernantoj preparas la teatraĵon *La Avarulo* de Moliero. Sed okazas strangaj eventoj: iu stranga persono aperas kaj la patro de Karla kaj Enzo malaperas...

Kulturdomo Gresiljona: kursoj, ekzameno kaj prelegoj *de la 23ª de julio ĝis la 2ª de aŭgusto 2021*

Profitu de la ĉeesto de elstaraj instruistoj kaj ĝuu la internacian etoson kastelan!

☆ Ilona Koutny estas profesoro en la universitato de Poznano en Polujo. Ŝi instruos al tiuj kiuj parolas flue.

☆ Renée Triolle estas lingvo-instruisto. Ŝi babiligos tiujn kiuj scias pli bone skribi ol paroli.
☆ Marc Giraud estas instruisto de muziko, sed ankaŭ por komencantoj kaj komencintoj.

☆ eblas trapasi ekzamenon de FEI (Franca Esperanto-Instituto).

★ Stefan MacGill enkadrigos serion de prelegoj pri *Kulturo pere de Esperanto* kadre de AMO, parte rete.

★ François Lo Jacomo gvidos serion de prelegoj, kadre de IEK (Internaciaj E-Konferencoj).
★ Ekskurso en la regiono, promenado, banado, laŭ via deziro.

Legi pli tie: https://gresillon.org/s3

Esperanto kaj TEA ĉe Radio

Alirprogramoj de RAI UNO



Vendredo 9 julio h. 14.50-15.00	Eldona agado por Esperanto de TEA
Lundo 9 aŭgusto h. 14.50-15.00	Italo Chiussi, triesta verkisto kaj tradukisto
Merkr. 8 septembro h. 14.50-15.00	Idiomoj uzataj kiel dua lingvo


Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos **vendredon la 3ªn de septembro ekde la 19ª horo!**

Ni atendas vin multnombraj, pretaj ekagadi por la prospero de nia TEA.

❁☺❁

Bonan someran tempon kaj...
ĝis septembro!



Aforismoj

Ĝentileco estas por la homa naturo kio por la vakso estas varmo.

Arthur Schopenauer, filozofo (1788-1860)



Forto de lingvo ne konsistas en forpuŝado de ĉio kio estas fremda, sed en ĝia asimilado.

Johann Wolfgang von Goethe, germana filozofo, verkisto kaj poeto (1749-1832)



Saĝo en la vivo konsistas en la forigo de ĉio kio ne estas esenca.

Lin Yutang 林語堂, ĉina inventisto, verkisto, tradukisto, lingvisto, filozofo (1895-1976)

Ni ĉiuj havas komunan originon, ni estas filoj de la evoluo de la universo, de la evoluo de la steloj, kaj do envere ni ĉiuj estas fratoj.

Margherita Hack, astrofiziko, sciencistino, akademianino (1922-2013)

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org